# *Díaz-Canel taksas nehaltigebla la vakcinadon kontra? Kovim-19 en Kubo*




Havano, jun 1 (RHK) La unua sekretario de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Kubo, kaj prezidento de la Respubliko, Miguel Díaz-Canel (sur la foto) asertis ?i-mardon, ke la vakcinado kontra? KOVIM-19 en la lando estas nehaltigebla, ?ar jam ekzistas unu miliono 70 mil 165 homoj, kiuj ricevis almena? unu dozon de 'Soberana 02' a? 'Abdala'.

La ciferoj cititaj de Díaz-Canel inkluzivas tiujn, kiuj estis vakcinitaj kadre de klinikaj provoj, intervenaj studoj kaj sanaj intervenoj.

?i tiu lasta ekzerco, realigita en riskaj grupoj kaj teritorioj, progresas rapide kaj la rezultoj estas kontentigaj, la? informite ?i-lunde en la kunveno de la Provizora Laborgrupo de la kuba registaro por la anta?zorgo kaj kontrolo de KOVIM- 19.

En sia Tviter.konto la prezidento asertis:

> La vacunación en #Cuba contra la #COVID19 es indetenible. Suman 1 070 165 las personas que tienen al menos una dosis de #Abdala o #Soberana. De ellas, 615 016 ya recibieron 2 dosis; 142 390 las 3.Lo que nos parecía casi imposible hace un año, va cobrando vida por todo el país.

La ?efurbaj municipoj Regla, Guanabacoa, La Habana del Este kaj San Miguel del Padrón, kie la interveno komenci?is la 12an de majo, la nombro da vakcinitoj reprezentas 98,9% de la tuto planita.

La municipoj de Boyeros, Arroyo Naranjo kaj El Cotorro ?us ali?is al ?i tiu procezo, kie la interveno anka? efektivigas la? plano.

En la speciala municipo Insulo de la Junularo, 97,7%  de la universo jam estis vakcinitaj, kaj la interveno en sanlaboristoj, BioCubaFarma kaj aliaj riskaj grupoj jam atingis 98 elcenton.

Anka? en la provincoj Matanzas kaj Santiago de Kubo, sanaj intervenoj komenci?is ?i-31an de majo, en la municipoj kun la plej granda epidemiologia komplekseco (Matanzas, Cárdenas kaj Colón, en la unua; kaj Contramaestre, Palma Soriano, San Luis kaj Songo-La Maya, en la dua).

?i-lunde, 343 establoj starigitaj por la vakcinado de la lo?antaro, nomataj ?i tie kiel vakcinejoj, malfermi?is kaj funkciis en la lando.

Fonto: ACN

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/259260-diaz-canel-taksas-nehaltigebla-la-vakcinadon-kontrau-kovim-19-en-kubo

Radio Habana Cuba